

forto ke Alicio eksaltis; sed ŝi tuj komprenis ke la Dukino alparolas ne ŝin sed la infanon: do ŝi refariĝis kuraĝa kaj daŭrigis:—“Ĝis nun mi ne sciis ke la *Ceŝŝa* katoj ĉiam grimacas; mi eĉ ne sciis ke ili havas tian kapablon.”

“Ĉiuj havas la kapablon” diris la Dukino “kaj la plimulto praktikas ĝin.”

“Mi mem ne konas eĉ unu praktikantan” diris Alicio, eksentante kun ĝojo ke jam fine komencas por ŝi vere interesa konversacio.”

“En tiu okazo, oni povas certiĝi ke vi tre malmulte konas” akre respondis la Dukino.

Ĉi tiun diron Alicio tute ne ŝatis, kaj tuj eksentis fortan deziron proponi alian temon. Dum ŝi penis trovi ion taŭgan, la kuiristino levis la kaldronon for de la fajro kaj komencis vigle ataki la Dukinon kaj la infanon; komencante per la fajriloj, ŝi ĵetis sur ilin ĉion atingeblan, ĉion ĵeteblan. Flugis tra la aero unu kaserolo, kaj kelkaj pladoj, kaj kvazaŭ hajlis per teleroj.

Tiujn eksterordinarajn ĵetaĵojn la Dukino ne atentis, eĉ kiam ili frapis ŝin, kaj la infano jam antaŭe tiel forte kriegis ke oni ne povis sciigi ĉu ĝi ricevas vundojn aŭ ne.

“Ho, rigardu, zorgu, — mi petegas — la infanon!” Alicio ekkriis.

Ŝi saltadis agonie. “Ho, ve! oni fortranĉos la amindan nazeton” — ĉar en tiu momento

granda kaserolo preterflugante atingis ĝin.

“Se ĉiu volus atenti nur siajn katojn, la Dukino per raŭka malaĝo tute forigis la mondo rondirus multe pli rapide.”

“Kaj tio ja estus nur malaĝo” diris Alicio, profitante la okazon montri al la mian instruitecon “Ni konsideru la rezulton efikus sur la tagdaŭro. La tagdaŭro la daŭro de dudekkvar horoj; ĉi tiu akso¹—”

“Ŝi parolis pri akso” diris la Dukino “do per akso dehakigu ĉi tiun akso.”

Alicio ne sen timo observis la rezulton. Ŝi sciigi ĉu ŝi volos plenumi la deziron. Sed la kuiristino klopodadis pri la rezulto ne aŭskultis. Sekve Alicio komencis “La daŭro estas dudekkvar horoj; ĉi tiu akso aŭ ĉu eble dekdu? Mi—”

“Ho, pri tio vi ne enuigiĝu” diris la Dukino “ĉar neniam mi povis plenumi ĉojn.” Kaj ŝi rekomencis vidi la rezulton kantante al ĝi strangaspecan kantaĵon ĉiu linifino ŝi forte skuis la kantaĵon:—

*Vi forte skuu la infanon
Ne traktu kondolencojn*

¹ En angla lingvo, “akso” havas la signifon “hakilo.”